

# KONTAKTO



## Malgrandaj etnoj

numero 231 (2009:3) ISSN 0023-3692

|  |    |
|--|----|
| <b>La mistero de la indianoj Mandan</b> (Gary Miller, Usono) .....                                 | 3  |
| <b>Kiam diverseco kaŭzas dividitecon: la sperto de Belgio</b><br>(Andreo Peetermans, Belgio) ..... | 4  |
| <b>Mirinda loko sur la tropiko de la Kankro</b> (Alice Liu, Ĉinio) .....                           | 6  |
| <b>Osetoj</b> (Slavik Ivanov, Rusio) .....   | 7  |
| <b>Kiu estas tiu bona samariano?</b><br>(Richard van Schaik, Nederlando) .....                     | 10 |
| <b>La ĉuvaŝa lingvo – problemoj kaj perspektivoj</b><br>(Aleksandr Blinov, Rusio) .....            | 11 |
| <b>Ĉukĉoj – la nacio, ŝatata de ĉiuj rusoj</b><br>(Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio) .....        | 12 |
| <b>Malbona elekto</b> (Kossi S. Woudji, Togolando/Senegal) .....                                   | 16 |
| <b>Batalema ĉevalo kaj saĝa malriĉulo</b> (Zoran Ĉirić, Serbio) ...                                | 16 |

#### Kiel sendi kontribuojn al Kontakto?

- ✓ Sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan.
- ✓ Se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Kontakto ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!
- ✓ Indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigra blankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ Rete bonvolu sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ Ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj!

**Koran antaŭdankon!**

#### Saluton, karaj legantoj de la revuo!



Jen la nova numero de “Kontakto”, ĉefe dediĉita al relative malgrandaj kaj malvaste konataj etnoj de la mondo. Vi povos ekscii pri la interesa indiana tribo Mandan, pri osetoj, samarianoj kaj ĉukĉoj; krome, vi povos legi pri interesa vilaĝo en Ĉinio, pri la problemoj de la ĉuvaŝa lingvo kaj ankaŭ pri la internaj problemoj de Belgio, kaŭzita de la etna diverseco. Fine vin atendas du facilaj tekstoj.

Mi memorigas al ĉiuj, ke viaj kontribuoj (kaj ankaŭ komentoj kaj rimarkoj) estas tre bezonataj por la bonfarto de la revuo – do ne hezitu kontakti nin, se vi havas kion diri! Viaj verkoj pri ĉiuj temoj, kiuj ŝajnas al vi interesaj, estas varme atendataj.

Agrablan legadon!

**Paŭlo (la redaktoro)**

#### Temoj de la venontaj numeroj de Kontakto

**Numero 233 (2009:5).** *La ĉef-temo: “Televido”.*  
**Rapidu pri la kontribuo!**

**Numero 234 (2009:6).** *La ĉef-temo: “Idoloj”.*  
*Ĉu estas bone aŭ malbone havi idolojn? Ĉu idoloj helpas aŭ malhelpas al ni fari personan elekton? Rakontu pri la homoj, kiuj laŭ via opinio grave influis vian vivon aŭ la vivon de via lando! Planata limdato: la 1-a de decembro.*

**Numero 235 (2010:1).** *“Moderna arto”.* *Ĉu la moderna amas-kulturo meritas la nomon “arto”?*  
*Ĉu la novaj teĥnologioj mortigas la arton aŭ male – donas al ĝi novan elanon? Ĉu en la moderna mondo la tradiciaj artoj plu havas la iaman gravecon? Rakontu pri viaj impresoj kaj ŝataĵoj en la moderna artista mondo! Planata limdato: la 15-a de januaro.*

**Kiel ĉiam, ajnatemaj kontribuoj estas bonvenaj!**

**KONTAKTO:** Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). Fondita en 1963. **N-ro 231** (2009:3), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/node/7>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:**  Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)>. **Redakcio:** Kontakto, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jalto, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <[kontakto@tejo.org](mailto:kontakto@tejo.org)>. **Redaktoro:** Paŭlo Mojajev (Ukrainio) **Tipografisto:** Lucas Vignoli Reis (kun helpo de skipo de Preface Design, <<http://www.preface.com.br>>). **Korektisto:** Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). **Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <[skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl)>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facilingvaj Artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila kaj facila*, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. **Anonctarifoj:** tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas double. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Vartantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn kontraŭ dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **Kontakto en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): Radio Havano (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea / 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15-a horo UTC), <[http://roi.orf.at/esperanto/es\\_demand.html](http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html)> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

# La mistero de la indianoj *Mandan*

Kompare al la averaĝa eŭropano, la divers-tribaj indianoj havas pli nigrajn harojn kaj pli nigretan haŭton. Sed inter la indianoj *Mandan* (mandan-lingve *Nueta*) ekzistas rakontoj pri unu klano, kies reprezentantoj havis helan haŭton kaj flavajn aŭ ruĝajn harojn. La posteuloj de la mandanoj mem kredas tiajn rakontojn eĉ nuntempe. Ĉu tiuj rakontoj estas veraj?

Gary Miller, Usono

La unua raporto pri tio troviĝas en la taglibro de franca peltnegocisto Verendrye. Li aŭdis rakontojn pri tiu popolo, sed en 1738 lia unua skribo pri la mandanoj diras, ke la mandanoj havas la kolorojn de ĉiuj aliaj indianoj. Tamen poste li skribis ankaŭ, ke inter la mandanoj estas tiaj, kiuj similas eŭropanojn. Ĉu tio veras, aŭ ĉu Verendrye simple volis allogi peltnegocistojn al la regiono? Poste, tamen, la usonaj esplorantoj Lewis kaj Clark en la jaroj 1804-1806 registris similajn informojn: ili skribis, ke la mandanoj havas pli blanketan haŭton.

Estas homoj, kiuj penis klarigi la rakontojn. Ekzistas legendo pri tio, kiel antikva kimra reĝido Madog veturis en la nuntempa ŝtato Georgio en Usono kaj poste venis al la mandanoj. Estis prezentitaj kelkaj nekonfirmitaj rakontoj pri indianoj, kiuj povis paroli la kimran lingvon; tamen Lewis kaj Clark post la serĉoj ne trovis tiajn. Historiistoj tamen pruvis, ke tiu reĝido neniam ekzistis. La fama usona pentristo George Catlin pentris multajn scenojn de mandana vivo; li tamen neniam vidis “blankulojn” inter la mandanoj. Malgraŭ tio, li subtenis la “kimran” version kaj kredis, ke la korboboatoj de la mandanoj similas tiujn de la kimroj.

Ni nun ankaŭ scias, ke la vikingoj vizitis Nordamerikon. Ĉu kelkaj vikingoj trafis la amikemajn mandanojn kaj povis loĝi kun ili? La posteuloj de la mandanoj mem preferas ĝuste tiun klarigon, sed tiu teorio ne estas vaste akceptita de historiistoj.

Alia ebla klarigo estas, ke la haroj de la mandanoj simple griziĝis en pli juna aĝo, ol ĉe la aliaj indianoj – kaj diversaj rakontoj simple trouzis tiun fakton. Tracy Potter, kiu antaŭnelonge verkis la libron “Shaheke” pri mandana kondukanto, diris: “Ĉu tio ne similas nin, eŭropanojn? La mandanoj plaĉas al ni, ni do eŭropigas ilin.”

Ĝis la jaro 1840 90% de la mandana loĝantaro formortis pro malsanoj, kiujn la eŭropanoj venigis al ili (ekzemple, pro variolo). La mandanoj tiam loĝis kun alia indiana tribo, *Hidatsa*. Poste usonaj soldatoj devigis tiujn tribojn

loĝi en rezervejoj. Hodiaŭ ekzistas nur kelkaj maljunaj indianoj, kiuj pretendas esti “veraj” mandanoj; ili havas gefilojn, kiuj estas nur duone mandanaj. La ekzisto de la “blankaj indianoj” do verŝajne por ĉiam restos mistero.



Tradici-forma mandana loĝejo, konstruita el ligno en 1923.



Mandano en la tradicia tuniko el cerva haŭto (1908 j.)

# Kiam diverseco kaŭzas dividitecon: la sperto de Belgio

La 10an de junio 2007, en Belgio okazis voĉdonado, kiu komencis unu el la plej gravaj krizoj en la ĝisnuna belga historio. La novelektita ĉefministro, Yves Leterme, sukcesis formi sian registaron nur post naŭ monatoj, kaj ankaŭ nun (julio 2008) la problemoj ankoraŭ ne finiĝis. Ŝajnas, ke la ĉefa fonto de ĉiuj malfacilaĵoj estas la tensioj inter la du ĉefaj popolgrupoj de la lando...

Andreo Peetermans, Belgio

## Jam pli ol jaro da krizo

Post la balotado antaŭ Leterme staris la defio formi sian registaron, sed tiu tasko evidentiĝis pli malfacila, ol oni povus antaŭvidi. Estis fortaj malkonsentoj inter la politikistoj, kiuj reprezentis Flandrion (la nederlandlingva norda parto), kaj tiuj, kiuj reprezentis Valonion (la suda parto, franclingva).

La rezulto estis, ke komence de decembro 2007 Belgio ankoraŭ ne havis registaron, kaj ke la internaciaj komunikiloj forte kritikis la landon. Grandparte por ĉesigi tiun kritikadon la politikistoj elpensis specialan, tute improvizan solvon: oni petis la malnovan ĉefministron, Guy Verhofstadt, ke tiu provizore regu la landon ĝis oni povos formi definitivon registaron. Reĝo Albert la Dua inaŭguris la intertempan registaron la 21-an de decembro kaj ĝi estris ĝis la 20-a de marto 2008. Tiam finfine ekaktivis la ministraro de Leterme (pli ol 9 monatojn post la voĉdonado).

Tio tamen ne finis la krizon en Belgio: la politikistoj ankoraŭ ne kapablis ekkonsenti pri la ŝtat-reformo, kiun postulas la flandraj politikistoj (kaj kiun mi pliklarigos ĉi-sube). La daŭraj negociado-problemoj instigis ĉefministron Leterme demisii – li faris tion la 14-an de julio. Sed la reĝo malpermesis al la demisiinto ekŝiĝi: Leterme do estis devigita resti kaj, plej grave, la problemoj en Belgio ade daŭras.

## Flandroj kontraŭ valonoj – kial do?

Post la batalo de Waterloo (1815) kaj la malvenko de Napoleono, oni reviziis la eŭropajn landlimojn dum la tiel nomata Viena Kongreso. Tie oni unuigis tion, kio nun estas Belgio kun Nederlando, en unu tutajon, kiu estis reĝota de Vilhelmo la Unua. En la suda parto de la Unuiĝinta Reĝŝtato Nederlando ekestis nekontento

pro la regmaniero de Vilhelmo, kaj ĝi relative pace sendependiĝis en 1830. La plej granda parto de la nova nacio estis franclingva (Valonio), sed en la nordo (Flandrio) oni parolis nederlande.

Pro tio, ke Valonio estis multe pli riĉa, ol Flandrio, estis facile uzi ekonomian premon por ke Belgio fariĝu tute franclingva ŝtato. La franca fariĝis la unusola lingvo uzebla en la parlamento, en juĝejoj, en mezlernejoj kaj universitatoj ktp., tiel ke flandro povis plenumi ĉefan funkcion nur post ĝisfunda franciĝo. La flandroj forte kontraŭstaris tiun subpremon de la nederlanda lingvo; baldaŭ aperis la Flandra Movado, kiu batalis por la rajtoj de la flandra lingvo kaj de ĝiaj parolantoj. Finfine en 1898 la nederlanda estis akceptita kiel la dua oficiala lingvo de Belgio.

Tio tamen ne kontentigis la plejmulton de la flandristoj. Ili elpensis la “teritoriecan principon”: lingvo estas ligita al la teritorio, kie ĝi estas parolata. Laŭ tiu principo Flandrio devus esti unulingva (tio estas, nederlandlingva) kaj la franca lingvo tie tute malaperu. Nova sukceso de la Flandra Movado alvenis en 1962. En tiu jaro, oni oficiale interkonsentis pri “lingvolimo” inter Flandrio kaj Valonio. Ekde 1970 komenciĝis federaliĝo de Belgio: ĝi dividiĝis laŭ lingvoj, ĉiu grupo ricevis iom post iom pligrandiĝantan aron de propraj respondecoj. La federaliĝo fariĝis definitiva en 1993.

La subpremo de Flandrio fare de Valonio nun estas afero de la pasinteco, sed tamen ĝi ankoraŭ ne estas forgesita. La flandristoj akre batalis por siaj lingvaj rajtoj, kaj ili ankoraŭ iom timas perdi ilin: multaj flandroj ne tute fidis sian alilingvan najbararon el la sudo.

## La problemo Bruselo

Nuntempa (federala) Belgio konsistas el tri Regionoj: la Flandra Regiono, la Valona Regiono kaj la Brusela



Ĉefurba Regiono. Paralele al tio Belgio konsistas el tri lingvaj Komunumoj: la Nederlandlingva, Franclingva kaj Germanlingva Komunumoj (la germanan oni parolas en relative malgranda teritorio en la oriento). En Flandrio oni parolas la nederlandan, kaj en Valonio la francan. Sed la ĉefurbo Bruselo estas iom speciala, ĉar ĝi estas dulingva teritorio: kaj la nederlanda, kaj la franca estas ĝiaj oficialaj lingvoj. Tiu dulingva brusela teritorio, kiu lokiĝas kvazaŭ insulo ene de Flandrio, kaŭzas tre seriozan problemon: Bruselo daŭre franciĝas kaj, pli grave, ĝi francigas ankaŭ la municipojn ĉirkaŭ si. Tiuj tamen apertenas al Flandrio kaj do laŭ la teritorieca principo devas esti nederlandlingvaj (“En Flandrio oni parolu la flandran”).

La problemoj plej klare montriĝas en la elektodistrikto Bruselo-Halle-Vilvoorde, la ununura belga elektodistrikto, apartenanta al du malsamaj Regionoj. Bruselo situas en la dulingva Brusela Ĉefurba Regiono, la municipoj Halle kaj Vilvoorde apartenas al la Flandra Regiono. La sekvo de tiu ĉi nekutima situacio estas ke en Halle kaj Vilvoorde, malgraŭ ilia flandrececo, franclingvaj partioj povas partopreni en la elektoj.

La flandraj politikistoj malŝategas tion, ĉar tiel pli grandigigas la franclingva influo en tiuj du municipoj, kiuj leĝe apartenas al Flandrio. Se Halle kaj Vilvoorde plene franciĝos (kaj tio jam grandparte okazis), ekestos franclingva teritorio ene de Flandrio. Tion Flandrio laŭ ĝiaj politikistoj pro la teritorieca principo ne povas toleri.

Pro tio la plej grava punkto de la supre menciita ŝtatreformo estas, ke oni dividu Bruselo-Halle-Vilvoorde por ke la franclingvaj influoj malaperu el Halle kaj Vilvoorde. La valonaj politikistoj tamen tute ne ŝatas tiun ideon. Ni jam vidis ke en Flandrio oni ĉefe aplikas la teritoriecan

principon; en Valonio oni tamen pli ofte aplikas la alian, nome ke ne estas akceptebla, se en komunumoj, kie granda parto el la loĝantaro parolas la francan, oni plenumu oficialajn aferojn nur en la nederlanda.

La du vidpunktoj rekte kontraŭas unu la alian, kaj tio estas la ĉefa kaŭzo de la nuna politika krizo en Belgio.

### Kio por la estonteco?

La bedaŭrinda konkludo el ĉio ĉi estas, ke post 178 jaroj da komuna historio la du ĉefaj belgaj popolgrupoj daŭre sentas sin ne unu popolo, sed du apartaj. Flandroj kaj valonoj tro ofte ne kapablas kompreni unu la alian kaj ankaŭ mankas reciproka fido. Ili dum la ekzisto de sia komuna lando ofte kontraŭis unu la alian, kaj ili ankoraŭ ne povas forgesi pri tio. Ekzistas multaj diferencoj inter flandroj kaj valonoj, kaj ne nur lingvaj.

Unu el la ĉefaj kialoj por la nekompreneco verŝajne estas la fakto, ke la du grupoj vivas geografie aparte kaj do ne tro ofte renkontiĝas. Interese estas rimarki, ke en Bruselo, kie nederlandlingvanoj kaj franclingvanoj kunvivas, la du lingvogrupoj interrilatas pli harmonie.

Oni ofte parolas pri la disdivido de Belgio; la ŝanco ke tio (baldaŭ) okazos, estas tamen relative malgranda. Interese, la plej grava fonto de malkonsento – nome Bruselo – ankaŭ estas tio, kio forte kunligas Flandrion kaj Valonion: neniuj politikistaro volas ke la ĉefurbo (ne nur de Belgio, sed ankaŭ de la Eŭropa Unio!) falu en la manojn de la alia grupo. Estas imageble, ke Bruselo povos unuigi la belgojn sufiĉe longe ĝis ili mem unuigu, trovu iom post iom kontentigajn solvojn al siaj problemoj kaj eble eĉ iam iĝu veraj belgoj, anstataŭ plu esti flandroj kaj valonoj. Kio okazos en la fino, neniuj povas diri.

# Mirinda loko sur la tropiko de la Kankro

Alice Liu, Ĉinio

En Ĉinio troviĝas aŭtonoma gubernio Mojiang, havanta la areon de 5 312 kvadrataj kilometroj. Ĝi troviĝas je 270 kilometroj for de Kunming, la ĉefurbo de la sudokcidenta provinco Yunnan. La loĝantoj de la gubernio plejparte apartenas al la malgranda etno *hani*. La tropiko de la Kankro dividas la gubernian urbon en du partojn, la nordan kaj la sudan. Tie troviĝas belaj oazoj kaj grandioza ĝardeno kun impona konstruaĵo, kiu markas la tropikon de la Kankro.



Naskiĝo de ĝemeloj estas aparta fiziologia fenomeno, kies probableco estas nur unu milono. Tamen inter 350 mil loĝantoj de Mojiang estas pli ol mil paroj da ĝemeloj: do, la naskiĝ-ofteco de ĝemeloj ĉi tie estas multe pli alta, ol en aliaj lokoj. Precipe en Hexi-vilaĝo tiu ofteco estas aparte granda: ĝi superas 4 elcentojn! Pro la tropiko de la Kankro, kiu pasas meze de la urbo, kaj la alta naskokvanto de ĝemeloj Mojiang fariĝis iom mistera loko, kaj oni nomas ĝin “hejmloko de ĝemeloj”.



Hexi-vilaĝo famas pro tio, ke en ĝi estas misteraj ĝemelaj putoj kun klara kaj dolĉa akvo dum la tuta jaro; kaj oni diras, ke trinkinte la akvon el la putoj virino naskos ĝemelojn. Ĉi tien venas novgeedzoj eĉ de la najbaraj provincoj por



Ĝemelaj putoj

trinki la akvon. La koncerna fako de la loka registaro analizis la akvon kaj trovis, ke ĝi konformas al la trinkakva normo kaj enhavas neniujn specialajn elementojn.

La alia maniero naski ĝemelojn (laŭ la lokaj kredoj) estas loĝi iom da tempo sur la tropiko de la Kankro. En la urbo estas hotelo, kies kvar ĉambroj troviĝas ĝuste sur la tropiko kaj estas ĉiam okupitaj en ĉiu sezono. Multaj novgeedzoj mendas la ĉambrojn precipe ĉirkaŭ la somera solstico (kiam la suno troviĝas en zenito), kaj tiam la prezoj de la hotelo estas multe pli altaj, ol tiuj de la sama hotelo alitempe aŭ tiuj de aliaj hoteloj.

En la gubernio regule okazas la internacia festivalo de ĝemeloj. Ĉi-jare en majo ĝin ĉeestis ĉirkaŭ 2 mil du- kaj triĝemeloj el Ĉinio kaj aliaj landoj.

Neniu povas fari sciencajn klarigojn pri tiel multaj ĝemeloj en Mojiang. Iuj diras, ke tion kaŭzas nekonata mineralo el la loka trinkakvo. Iuj opinias, ke la kaŭzo rilatas al la sunbrila tempodaŭro, ĉar la tropiko de la Kankro trairas la gubernion. Iuj konkludas, ke la fenomeno rilatas al raso, ĉar ĉi tie ĉefe loĝas la etno *hani*. Eble la sciencistoj farinte la necesajn studojn iam povos klarigi tiun fenomenon.

# Osetoj

En Norda Kaŭkazio distancoj estas tre densaj. Se en centra Rusio centkilometra vojaĝo ŝanĝas nenion, en Kaŭkazio post ĉiuj kelkaj kilometroj komenciĝas nova etna mondo: eblas veturi per aŭto unu horon kaj veni al loko kun alia kulturo, religio, lingvo kaj moroj. Aperas la impresoj, ke post fiasko de la Babelturo ties konstruintoj translokiĝis ĉi tien.

Slavik Ivanov, Rusio

## Historio

En la centra parto de la Kaŭkaza montaro loĝas *osetoj*, la sola popolo inter la indiĝenaj etnoj de la regiono, kies lingvo estas hindeŭropa, de la irana grupo. Sciencistoj opinias plej kredebla la hipotezon, ke osetoj estas restaĵo de la iam tre vasta mondo de iranlingvaj migrantaj popoloj: scitoj, sarmatoj kaj alanoj. Venoj de la mongolaj trupoj en tiun ĉi landon kaj postaj invadoj de Timur la Lama kaŭzis ruiniĝon de Alanio, la restinta loĝantaro kaŝis sin en la montaro de centra Kaŭkazio, miksiĝinte kun la indiĝenoj. Tiel oni klarigas la strangan fakton, ke meze de Kaŭkazio ekzistas popolo, parolanta la lingvon de la orienta irana lingvogrupo.

Fine de la 18-a jarcento Osetio libervole eniris la Rusian Imperion. Pli frue grupo de popolaj deputitoj venis

en Peterburgon por peti carinon Katerino la Granda pri defendo kontraŭ multaj malamikoj de la montara landeto, kiu okupis tiam ne pli ol duonon de la moderna teritorio. Aliĝo al Rusio malgraŭ multaj malfacilaj sekvoj havis ĝenerale pozitivan efikon. Osetoj, ne plu sub premo de kabardaj nobeloj, povis fondi vilaĝojn sur la antaŭmonta plataĵo. Kun paso de la tempo la tuta montara loĝantaro fakte translokiĝis al la plataĵo, kie la klimataj kondiĉoj kaj fekundeco de la grundo estis multe pli favoraj. Nur dum la 19-a jarcento la oseta etno kreskis dekoble, de ĉ. 30 mil komence de la jarcento ĝis ĉ. 300 mil en ĝia fino.

Komenco de la 20-a jarcento estis tempo de ekfloro de la osetaj kulturo kaj literaturo. En 1899 aperis la poezia libro de Kosta Ĥetagurov (kiu estas konsiderata kiel fondinto de la literatura oseta lingvo) "Oseta Liro". Inter



Osetoj en la naciaj vestoj

la verkoj de Kosta estas multaj popolaj fabloj kaj legendoj, kiujn li rerakontis rime, kaj versoj por infanoj. Ankoraŭ dum la vivo de la poeto liaj verkoj estis rerakontataj en la montaro buŝe (tiam tute ne ĉiuj osetoj scipovis legi). Post Ĥetagurov aperis multaj aliaj verkistoj kaj tradukistoj – tion subtenis en 1920-30-aj jaroj la sukcesa sovetia politiko de disvolvigo de la lokaj lingvoj. Ekde la jaro 1923 aperadas la osetlingva tagĵurnalo “Raŝtdzinad” (“Veró”), ekzistas ankaŭ kelkaj aliaj osetlingvaj periodaĵoj, inter kiuj elstaras literatura revuo “Maĥ dug” (“Nia epoko”).

Osetoj aparte fieras pri la partopreno de siaj samgentanoj en la du mondmilitoj. Ĉiu kvara viro el la foririntaj al la Dua Mondmilito tiam ne revenis hejmen. Famas la apudvoja monumento en centra parto de Nord-Osetio: statuo de morna virino kaj sep grupoj super ŝia kapo. Ĝi estas monumento omaĝe al la fratoj Gazdanov, ili estis sep en sia familio, kaj ĉiuj sep pereis en la bataloj.

Multajn problemojn de la nuntempo naskis la sovetiaj migriroj de etnoj, la unua el kiu okazis en la jaro 1920, kiam la nova potenco dankis la subtenon flanke de inguŝoj, donacinte al ili fekundajn ĉemontarajn terenojn, en kiuj tiam loĝis kozakoj (etna, dum la imperia tempo ankaŭ socia, grupo de rusoj). La kozakojn oni (kun multaj kruelajoj) transloĝigis al ekstrema nordo de la lando. Dum la Dua Mondmilito, en 1944, inguŝoj mem (kaj kelkaj aliaj etnoj) estis perforte translokigitaj en Kazaĥion kaj Kirgizion pro la akuzo pri kunlaborado kun la malamikoj. Multaj mortis laŭvoje, en la var-vagonoj. En la inguŝajn vilaĝojn same nelibervole estis loĝigitaj osetoj kaj rusoj. Kiam la inguŝoj revenis el la ekzilo, parto de ilia iama teritorio restis en Nord-Osetio, anstataŭ ĝin oni transdonis al la tiama Ĉeĉen-Inguŝio du ebenajn subregionojn de la Stavropola regiono. La reciprokaj malŝatoj pro la pridisputata tereno jam kaŭzis armitan interetnan konflikton inter Inguŝio kaj Osetio en 1992 kaj amasajn protestojn ankoraŭ en sovetiaj tempoj. La teruraĵoj de 2004 en Beslano, laŭ la fakuloj pri Kaŭkazio, eble celis reekflamigon de la konflikto inter osetoj kaj inguŝoj. Kvankam senperaj armitaj bataloj ne okazis, la rilatoj inter la du popoloj denove draste malboniĝis.

### Subetnoj

Moderna oseta etno konsistas el tri klare distingeblaj subetnoj: ironoj, digoroj kaj kudaroj (sudanoj). La plej granda el la tri estas la grupo de *ironoj*, kiu konsistigas pli ol duonon de la tuta etno. La irona prononcmansiero regas en la elektronikaj amaskomunikiloj (televido kaj radio), la ironaj gramatikaĵoj troviĝas en la bazo de la literatura oseta lingvo. Tipaj nomoj de ironoj estas nomoj de eposaj herooj *Soslan*, *Batraz*, *Aĥŝar*, *Azamat*, *Agunda*, *Dzerassa*, populariĝis ankaŭ kristanaj nomoj *Aleksander*, *Georgij* ka. La plej popularaj inter ĉiuj tri osetaj subetnoj dum du lastaj

generacioj estas la vira nomo *Alan* (laŭ la etna nomo de antikvaj *alanoj*) kaj la virina *Zarina* (“ora”).

*Digoroj* tradicie loĝas en la okcidenta parto de Nord-Osetio (trovu sur bona mapo la urbeton Digora por imagi). En la 1920-aj jaroj digoroj estis konsiderataj kiel aparta popolo en Sovetio, tiam formiĝis la digora skribsistemo, digora literaturo kaj firmiĝis la digora identeco. Ĝis nun eblas renkonti digorojn, kiuj identigas sin pli digoro ol oseto. La digora dialekto sufiĉe forte diferencas de la irona lingvoformo; la digora estas konsiderata kiel pli antikva (konservema) formo de la oseta lingvo, ĝi estas “pli irana”, se eblas tiel ĝeneraligi. Eble pli ol duono de digoroj estas tradiciaj islamanoj, tio kaj la influo de la apuda kabarda etno faris digorojn tre aparta grupo de osetoj. Multaj el ili nuntempe loĝas en urboj, ne nur en Osetio. Ekzemple, la fama orkestrestro, arta gvidanto de la operejo “Mariinskij” en Peterburgo, Valerij Gergijev estas digoro. Nomoj de digoroj ofte estas islamaj: *Mahomet*, *Fatima* ka., sed uzatas ankaŭ kristanaj kaj lokaj osetaj nomoj.

La tria grupo estas *kudaroj* – tiu nomo pli kaj pli ofte estas anstataŭata de la geografie priskriba nomo “sudanoj”, ĉar ili loĝas sude de la kaŭkazaj pintoj. Sudanoj estis multe influitaj de la kartvela kulturo, sed ilia dialekto estas fakte la sama kiel la irona, almenaŭ en la skriba formo, kun kelkaj regulaj fonologiaj ŝanĝoj (ekzemple, la vorto *ævjag* “lingvo” sonas kiel *evzag* en la sudo). Kudaroj amase loĝas ankaŭ en Nord-Osetio, kien ili venis per du grandaj ondoj: en la 1920-aj jaroj kaj en 1991-1992, ambaŭfoje pro armitaj konfliktoj en Sud-Osetio. Kudaroj, krom uzi la osetajn kaj rusajn (ortodoksajn) nomojn, foje nomas siajn infanojn per kartvelaj nomoj (*Badri*, *Tariel* ka.). Ili ankaŭ famas en tuta Kaŭkazio per la nomoj kiel *Sokrat*, *Napoleon*, *Anri*, *Ĝungli*, *Apolon* ks.

### Moroj

La oseta etiketo, *iron ahdaŭ*, estas konsiderata kiel tre grava valorajo inter la modernaj osetoj. Ili strebas sekvi postulojn de la etiketo, eĉ kiam tio kaŭzas malprofiton aŭ personan malkomforton. Lastatempe en mezlernejoj oni enkondukis la studobjekton “Osetaj tradicioj”, grandan parton de kiu konsistigas la studado de la tradicia etiketo. La oseta etiketo baziĝas sur gastamo kaj granda respekto al pliaĝuloj. Jen kelkaj postuloj de la oseta etiketo (listigitaj en unu el la osetaj ret-forumoj):

- » Oseto devas esti modesta pri manĝado kaj drinkado. Ne indas tromanĝi aŭ manĝi avare, eĉ se oni vere malsatas. Pro modesteco oni kutime rifuzas proponitan manĝon. Tial la propono povas soni trifoje – por emfazi la sincerecon de la propono.
- » Tute ne akcepteblas manĝi sola kiam apudas ali-





uloj. Necesas unue proponi parton de la manĝaĵo al la ĉeestantoj.

- » Oni ne parolas laŭte (kaj tiom pli ne uzas maldecaĵojn) en la ĉeesto de pliaĝuloj kaj virinoj.
- » Estas ofende trairi inter du parolantoj, necesas ĉirkaŭiri ilin, eĉ se tio postulas devojiĝon, aŭ halti kaj atendi, kiam la parolantoj rimarkos vin kaj lasos trairi.
- » Al ĉiu veninta gastu en oseta hejmo oni nepre proponas manĝon kaj trinkon. Etiketo malpermesas pridiskuti aŭ ofendi la veninton; eĉ se gaste venis malamiko, necesas akcepti lin kun maksimuma estimo. Tio estis vaste uzata por repaciĝo en la tempo, kiam inter osetoj ankoraŭ estis praktikata la "sanga revenĝo" (vendeto).
- » Menciante mortintojn, oni nepre aldonas "ruĥŝag ŭad" ("estu li destinita al helo" – paradizo estas tradicie imagata kiel tre hela loko).
- » La rusa proverbo "se la edzo batas, do li amas" estus sen-senca en Osetio; insulti kaj tiom pli bati virinon estas ne nur hontego, sed ankaŭ danĝera afero, ĉar la familio, el kiu devenas la virino, ĉiam bone zorgas pri ŝi.
- » Estas maldece elmontri amon al siaj infanoj, karesi la edzon (edzinon), alvoki proksimulojn karesforme en la publiko. Edzinoj kutime mencias sian edzon per la formo "mia viro" aŭ similaj, sed ne per la nomo.

Osetaj ĉetablaj kunvenoj, ĝojaj aŭ funebraj, estas fakte komunaj preĝoj. Tio, kion okcidente oni nomas tosto, en la oseta lingvo nomiĝas *kuvd* ("preĝo"). Por *kuvd*-oj oni kuiras bongustajn grandajn kukojn kun fromaĝo kaj preparas lokan specon de biero. La unua tosto estas ĉiam preĝo al la Majesta Dio: tradicia oseta religio estas monoteisma, kvankam osetoj preĝas ankaŭ al Vástirĝi (etimologie devenas de Sankta Georgo) kaj aliaj sanktuloj

(foje traktataj kiel dioj). La sinsekvo de ĉetablaj preĝoj estas fiksita, sed la preĝoj mem estas ĉiam la eblo por lingva kreemo. Preĝoj restas preskaŭ la sola uzkampoj, kie la oseta lingvo estas uzata senescepte. Inter si kaj eĉ ene de familio modernaj osetoj pli ofte uzas la rusan. En ĉiu loĝloko estas sia plej elokventa pliaĝulo, *ŝiĥi ĥiŝtar* ("aĝulo de la loĝbloko"), kiu gvidas la preĝajn festojn, foje ankaŭ kunordigas preparadon al ili.

Bedaŭrinde en la ritmo de moderna urba vivo multaj osetoj perdis la scion de la oseta lingvo. Nur ĉirkaŭ 20% scipovas skribi en la oseta. Subtene de Unesko kaj ŝtataj institucioj okazas eksperimento pri dulingva edukado en mezlernejoj, kiu devas subteni bonan parolkapablon en la oseta inter la lernejoj.

### La oseta lingvo

La oseta lingvo estas mirinda kunfandiĝo de hindeŭropaj kaj kaŭkaziaj lingvaj trajtoj.

### Hindeŭropaj trajtoj:

- » La baza vortaro plejparte konserviĝis hindeŭropa: *mad* signifas 'patrino', *dywæ* signifas 'du', *dæs* 'dek', *mæ/dæ/næ/wæ* estas respektive mia/via (sing.)/nia/via (pl.).
- » Malgraŭ la aglutina deklinacio, la konjugacio restis fleksia: ekz., *fyŝæm* signifas 'ni skribas', kie *-æm* estas la regula finaĵo por la 1-a persono en pluralo kaj similas al la respektiva finaĵo en multaj hindeŭropaj lingvoj.
- » Ekzistas interesaj paraleloj inter la oseta kaj la slavaj lingvoj. Ekzemple, la rusa vorto *inój* ("alia") ne havas alian klaran etimologion krom la nord-iranano: en la oseta ekzistas la vorto *innæ* kun la sama signifo. Inverse, la oseta vorto *qælæs* ("voĉo") ne havas alian pli taŭgan etimologion, ol de la slavaj *glas/golos*.

### *Kaukaziaj trajtoj:*

- » Nur la oseta havas naŭ kazojn, ĉiuj aliaj iranaj lingvoj havas malpli riĉan deklinacian sistemon.
- » Ne-hindeŭropaj radikoj eniris eĉ la bazan vort-provizon.

- » Aperis tipe kaukazaj glotaj okluziaj konsonantoj, kiuj formas la triopojn “voĉa-senvoĉa-glota”: d - t - t', b - p - p', d - t - t', dz - c - c' ktp. Same stranga por hind-eŭropa lingvo estas la uvula konsonanto [q], renkontebla interalie en la araba kaj en pluraj tjurkaj lingvoj.

## Kiu estas tiu bona samariano?

Kiam antaŭ kelkaj semajnoj mi aŭdis pri samarianoj, mi konis tiun vorton nur el Biblio: ĝi rakontas pri la bona samariano, kiu helpis la prirabitan vojaĝanton, kiu estis peterpasata de ĉiu judo. Tamen nur malmultaj homoj scias, ke fakte tiuj samarianoj daŭre vivas! Temas pri malgranda popolo kun sia propra kredo.

Richard van Schaik, Nederlando

Por konatiĝi kun la samarianoj pli bone mi decidis viziti ilian loĝ-lokon – la monton Gerizim. La monto situas proksime al Nablus en la Palestinta teritorio. Sur la monto loĝas la plejparto de ilia kelkcent-homa komunumo (diversaj pritaksoj mencias la nombrojn inter 600 kaj 720). Samarianoj konsideras sin nek palestinanoj, nek israelanoj. Ili posedas ambaŭ pasportojn, tamen ne estas helpataj de ambaŭ registaroj.

Antaŭlonge samarianoj estis granda popolo: en la 4-5-a jc. a. K. ili nombris ĉirkaŭ 1 500 000 homoj. Tamen pro konvertiĝo al kristanismo kaj islamo, pro diversaj persekutoj en 1917 ilia popolo konsistis jam el nur 146 homoj. Nuntempe pro pli da sekureco la samariana komunumo povas finfine rekreskadi. Tiu kresko tamen okazas ne tre rapide. Ili ofte geedziĝas al siaj parencoj kaj pro tio naskas multajn handicapitojn kaj infanojn, kiuj foje ne longe vivas.

Por esti konsiderata kiel samariano oni devas laŭi la sekvajn 4 kriteriojn:

1. Vivi por ĉiam en la Sankta Lando
2. Ĉiujare partopreni en la oferado dum Pasko sur la monto Gerizim
3. Festi la sabaton kiel estas priskribite en Torao
4. Obei la leĝojn de Torao pri pur- kaj malpureco

Samarianoj do same kiel judoj konsideras kaj obeas Toraon kiel sanktan libron, tamen, ilia versio de Torao iom diferencas disde la juda. La samariana Torao estas skribita en la pra-hebrea lingvo, ankaŭ la parolata lingvo estas la sama. Iliadire tiu lingvo estas la plej malnova lingvo de la mondo, kaj ĉiu alia lingvo estas bazita sur ĝi.

La kvar bazaj principoj de la samariana kredo estas la jenaj:

1. Unu Dio, kiu estas la Dio de Israelo
2. Unu profeto, Moseo, kiu rivelis Toraon al la homoj
3. Unu sankta libro – Torao, ricevita fare de Moseo disde la Dio
4. Unu santa loko – la monto Gerizim

Nuntempe samarianoj multe okupiĝas pri pacfarado. Ili preĝas por la paco inter Israelo kaj Palestino, kaj okupas multajn registarajn poziciojn. Ili ankaŭ prizorgas novkonstruitan Internacian Paco-Centron, en kiu ili volas kunvenigi grupojn el la tuta mondo por paca diskutado kaj dialogo.

Konklude, samarianoj estas tre malnova popolo kun tre komplika historio. Nuntempe ilia komunumo ŝajnas kreski, sed ĉu ili sukcesos bone adapti sin al la nova epoko – tio estas ankoraŭ granda demando.



Samarianoj sur la monto Gerizim (2006)

# La ĉuvaŝa lingvo – problemoj kaj perspektivoj

“Salam” en la ĉuvaŝa signifas “Saluton”. Certe, ĝi gustas arabe, sed la vorto bone enradikiĝis en la ĉiutaga vivo de la popolo, kiu loĝas en la Meza Volgio kaj nombras ĉirkaŭ unu kaj duonan milionon da homoj en Rusio. Mi kredas, ke tiu vorto povas enkonduki vin en la mondon de unu el plej neordinaraj lingvoj, apartenantaj al la tjurka lingva familio. Mi pretas iom gvidi vin tra la ĉuvaŝaj lingvo, kulturo kaj lando.

Aleksandr Blinov, Rusio

## La lingvon mortigas la urboj

Ĝis mi iĝis tri-jara la ĉuvaŝa estis mia sola lingvo, per kiu mi malkovradis la mondon kaj lernis pri la vivo. Tamen, post kiam mi fariĝis ĉirkaŭ 3-jara, mia familio iris en urbon, kie mi komencis viziti infan-ĝardenon – kaj en la unua tago mi ekhavis lingvan ŝokon.... Ĉar mi konstatis, ke en la ĝardeno “neniu scipovas paroli” – tiel mi diris al mia patrino, kiam ŝi venis preni min el la ĝardeno. Efektive, la urba vivo de la 70-aj jaroj ne antaŭvidis la ĉuvaŝan lingvon en la infanaj ĝardenoj, en la baza kaj meza lernejoj, en la vendejoj, stratoj, publika transporto, do la lingvo ĉefe kaĝis en la hejmoj de la familioj, kiuj migris en urbon por trovi laboron kaj pli kvalitan vivon.

La soci-politikaj ŝanĝoj de la 80-90-aj alportis novajn pensojn, sintenojn, energion en la vivon de Ĉuvaŝio. Aperis kelkaj lernolibroj de la ĉuvaŝa, ekfloris la ĉuvaŝ-lingva gazetaro, oni adoptis leĝon pri la ĉuvaŝa lingvo kaj tiu iĝis aŭdebla en la koridoroj de la oficejoj, fabrikoj, publika transporto. La lingvo ekhavis novan vivon, sed ĝi ne penetris en la ĉiutagan vivon de la junularo, kiu naskiĝis en urboj. Nur malmultaj urbanaj gepatroj parolas kun siaj gefiloj en la ĉuvaŝa, preferante la rusan. Kaj laŭ la lastaj konkludoj de ekspertoj de UNESCO, la ĉuvaŝa lingvo estas sub minaco de malapero... Necesas aldoni, ke inter la malaperantaj lingvoj de Rusio estis listigitaj ankaŭ la baŝkira, kalmuka, udmurta, jakuta kaj aliaj lingvoj. Fakte, la vivkapablo de la lingvo estis difinata laŭ naŭ kriterioj, inter kiuj estas i.a. la kvanto de la parolantoj, transdono de la lingvo de generacio al generacio, atingeblo de lerno-materialoj, rilato al la lingvo interne de la socio.

Necesas diri, ke la ĉuvaŝa lingvo en Ĉuvaŝio estas la oficiala lingvo kune kun la rusa kaj laŭ la informoj de la Ministerio pri edukado nuntempe en la Respubliko en 344 lernejoj ĝi estas instruata kiel denaska lingvo kaj en aliaj 198 – kiel la deviga studobjekto. Tamen necesas ankaŭ aldoni, ke la 198 lernejoj estas tiuj, kiuj troviĝas en la urboj kaj laŭ la nombro de lernejanaj ili kutime kelkoble

pli grandas, ol la 344 malgrandaj vilaĝaj lernejoj. La ciferoj aspektas pli optimismaj, ol la realo.

La registaraj politikistoj neglektas la uzon de la ĉuvaŝa en preskaŭ ĉiuj kampoj de la socio, farante ĝin pli folkloro, ol uzebla. Neniu registara retejo, nek lerneja, nek regiona uzas la ĉuvaŝan lingvon. La parolado de la prezidento de la Respubliko komenciĝas per la esprimo “Хаклә юлтайсем” (legu: *hakla jultaŝsem* – “karaj kamaradoj”), per kio la ĉuvaŝa lingvo finiĝas... Pro la manko de la modela uzado de la ĉuvaŝa fare de la registaro, sed nura flanka uzo plejparte ligita al folkloro aŭ al strikta protokolo, la novaj generacioj de la urbaj ĉuvaŝoj daŭre ruslingviĝas. La ĉuvaŝa malaperas samrapide kun la urbiĝo de la loĝantaro.

## Historio kaj lingvistiko

Laŭ la esploroj de diversaj sciencistoj la ĉuvaŝoj formiĝis kiel popolo en la 13a jar-cento surbaze de aŭtoktonaj popoloj de finn-ugraj marioj kaj alvenintaj tjurkaj triboj de prabulgaroj kaj suvaroj (suvazoj). Oni supozas, ke la memnomo de ĉuvaŝoj estas la kripligita formo de unu el popoloj – suvazoj.

La ĉuvaŝa lingvo situas iom for de ĉiuj ceteraj tjurkaj lingvoj, kaj ĝi estas karakterizata de specifajoj en la prononcado de “r” kaj “l” anstataŭ la ĝeneraljtjurkaj “z” kaj “ŝ”. Ekzemple, en la ĉuvaŝa “her” signifas “junulino”, dum ĝeneraljtjurke tio sonos kiel “kiz”, “hel” en la ĉuvaŝa estas “vintro”, dum ĝeneraljtjurke – “kiŝ”. La pluralo en la ĉuvaŝa havas ĉiam la saman finaĵon “-sem”: “tus” – amiko, “tussem” – amikoj, malsame de la tjurka “-lar”. En la leksiko oni trovas vortojn devenantajn el la iranaj, arabaj, finn-ugraj lingvoj, sed ankaŭ el la kartvela, ĉina, mongola.

La ĉuvaŝa lingvo havas du grandajn dialektojn: la sudan (*anatri*) kaj la nordan (*virjal* aŭ *turi*). La literatura lingvo formiĝis surbaze de la suda dialekto, kies karakteriza trajto estas “u-umado”, ekz. “ŝjuk” – “ne”, dum en la norda dialekto oni diras “ŝjok”.

Kvankam la mezepokaj tataraj kronikoj parolas pri

la ekzisto de libroj en la ĉuvaŝa, neniu tiama teksto konserviĝis. La literatura lingvo estis starigita en la 1870-aj jaroj en la urbo Simbirsk (nuntempe Uljanovsk, ekster la limoj de la Ĉuvaŝa Respubliko fiksita en 1925), ĉefe dank' al la laboroj de la instruisto Ivan Jakovlev kaj la lingvisto Nikolaj Aŝmarin (verkinto de impona 17-voluma vortarego de la ĉuvaŝa lingvo). Baldaŭ ekfloris literaturo, ĉefe poezio kaj teatraĵoj. Elstaras la longa nacia poemo *Narspi* de Kostantin Ivanov kaj verkoj de Sespel Miŝŝi. Post la Dua Mondmilito plimultiĝis romanistoj, ekz. Ĉindikov, Lisina. Inter la ĉuvaŝoj, kiuj famiĝis ekster Rusio, necesas nomi la poeton-avangardiston Gennadij Ajgi.

### Kion do fari?

La socia organizo, kiu klopodas evoluigi la ĉuvaŝan lingvon, estas la Ĉuvaŝa Nacia Kongreso, kiu dum la lasta tempo iom burokratiĝis kaj fakte plenumas la instrukciojn de la registaro. Mankas socia organizo, kiu efektive entreprenas ion por promocii la ĉuvaŝan lingvon en la ĉiutaga urba kulturo, tirante ĝin el la limigita rondo de folkloraj dancoj, mez- kaj sub-nivelaj kantoj, malbonvena rilato de la ruslingva loĝantaro pro la deviga (kaj malmoderna)

instruado de la ĉuvaŝa lingvo en la lernejoj.

Sian pli aktivan engaĝiĝon pri la problemoj komencis montri lokaj esperantistoj, iniciatintaj la Lingvan Festivalon, la aranĝon partoprenatan de ĉirkaŭ mil gejunuloj. Ekzemple, ĉi-jare oni planas laŭeble egaligi la ĉuvaŝan lingvon kun la rusa en la prezentoj kaj varbmaterialoj, interesaj prelegoj k.s. La provizora programo antaŭvidas fari la kurson de la ĉuvaŝa lingvo (tiaj simple ne okazas en la regiono), okazigi konferencon, seminariojn, rondajn tablojn kaj kvizojn.

Dum la lasta tempo mi multe parolas kun mia kvin-jara filo pri lingvoj, pri Esperanto, pri la rusa lingvo, pri la ĉuvaŝa – kaj li scias, ke li devas posedi krom la rusan ankaŭ Esperanton kaj la ĉuvaŝan. Li, ekzemple, scias la vorton “ĉipér”, kiu en la moderna ĉuvaŝa lingvo signifas “ĝis” kaj kutime estas dirata inter la amikoj, kvankam por ĝisrevidi ekzistas pluraj aliaj formoj, kiel “tepré kuriĉĉén!” (ĝis revido), kaj eĉ pli malnovaj formoj “síva pul” (bonfartu) aŭ “ĉipér kaj” (por tiu, kiu foriras) kaj “ĉipér jul” (por tiu, kiu restas). Tamen nun mi volus diri al vi “Ĉelhesen festivalenĉe ira sunsa ketetper!” (“Bonvenon al la lingva festivalo!”).

ARTIKOLO

## Ĉukĉoj – la nacio, ŝatata de ĉiuj rusoj

En folkloro de ĉiu nacio de la mondo oni povas renkonti tradiciajn ŝercojn pri iu popolo, kiu estas priridata kaj elmontrata kiel plej stulta: en Usono kaj Germanio stultaj kaj tro religiemaj ŝerc-protagonistoj estas poloj, en Hispanio – portugaloj, en Francio – svisoj kaj belgoj. Eĉ ene de unu ŝtato, Germanio, en unu provinco oni ofte ŝercas pri homoj el la najbara (ofte, ekzemple, pri frisoj). Tiun rolon en iama Sovetunio kaj nuna Ruslando ludas malgranda norda popolo kun (por la rusa orelo) amuza nomo “ĉukĉoj”.

### Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio

#### Herooj de anekdotoj

Male al Esperanto kaj aliaj lingvoj, en la rusa lingvo “anekdoto” signifas mallongan plene elpensitan ŝercon, kompare al “historia anekdoto”, kie estas priskribita iu amuza okazaĵo, kiu, tamen, reale okazis al iu konata persono.

Anekdotoj estis (kaj plu estas) ege popularaj en Sovetunio, ĉar ili estis la sola eblo por la popolo priridi la absurdaĵojn de la komunisma reĝimo kaj unu-partia sistemo, reganta en tiama Sovetunio. Anekdotoj, trafaj kaj

skurĝaj, aperadis en popolo kaj disvastiĝis kvazaŭ incendio; ne ĉiam ili estis politikaj, ĉar en Sovetunio estis ankaŭ aliaj temoj por ridi, malpli danĝeraj.

Unu el la plej konataj herojoj de tiuj anekdotoj estis ĉukĉoj, jen ĝuu kelkajn vere klasikajn ŝercojn pri ili:

*Ĉukĉo venas en vendejon kaj demandas, ĉu oni vendas kolorajn televidilojn.*

*– Jes, certe! – respondas la vendisto.*

*– Bone, donu al mi la verdan!*

Ĉukĉo aĉetas grandan fridujon. Oni demandas lin:

- Ĉukĉo, kial vi bezonas tiom grandan fridujon?
- Ho, en fridujo estas -4 gradoj, dum en tundro estas -40, mi sidos tie en varmo.

Ĉukĉo demandas ĉe la giĉeto por flugbiletoj:

- Kiom longe daŭras la flugo Moskvo-Ĉukotko?
- Unu momenton...
- Dankon!

Kial ĉukĉoj alprenis tiun rolon de priridata popolo? Jam neniu povas memori pri tio. Certe, gravan influon havis la populara soveta filmo "Estro de Ĉukotko", kie oni unue sur ekrano prezentis la specifan parolmanieron de tiu popolo en la rusa: oni uzas la vorton "tamen" (ruse "odnako") en la senco de "jen kial", "tiele", "jen pro tio" (kaj poste fakte oni simple abunde uzis tiun vorton ajnasence nur por imiti la ĉukĉan parolmanieron). Naiva historio pri juna rusa soldato, kiu subite fariĝas estro de la tuta lando kaj perlaboras grandan monon, restante fidela al sovetaj idealoj (kun sia pleja naiveco) kaptis multajn – sed anekdotoj pri ĉukĉoj ekzistis jam antaŭe.

Tamen, ne ĉiam nur naiva ĉukĉo estis priridata en tiuj anekdotoj, foje oni uzis lian naivecon por montri iun absurdan aspekton de la diktatura soveta reĝimo:

Ĉukĉo telefonas al la Certa Komitato de la Komunisma Partio:

- Ha lo, mi volas iĝi membro de la Komitato. Kion mi bezonas por tio?

Oni respondas:

- Ho, ĉu vi estas idioto???
- Ĉu tio estas nepra kondiĉo?

## Ĉukĉoj kiel popolo

Laŭ la rezultoj de la lasta popolnomrado en Ruslando, kiu okazis en 2002, ĉ. 16 mil homoj alkalkulas sin al ĉukĉoj. Ĉukĉoj loĝas sur la tuta teritorio de Ruslando kun la plej granda loĝ-denso en Ĉukotko, la regiono en la nord-orienta ekstremaĵo de Ruslando kun areo de ĉ. 740 mil kvadrataj kilometroj.

Kompare al la kutima bildo pri ĉukĉoj kiel popolo, kiu loĝas en tendegoj el bestaj feloj ("ĉumo") kaj veturas en sledoj, movataj de cervoj, ĉiuj nuntempaj ĉukĉoj loĝas en brikaj aŭ panelaj domoj kaj ne plu praktikas la tradicion vivmanieron – estas ja multe pli oportune loĝi en hejtata moderna domo, ol en tiu fela tendo.

La mem-nomo de la popolo estas *oravetljet* ("homoj") aŭ *lig-oravetljet* ("veraj homoj"), dum la rusa (kaj ankaŭ Esperanta) nomo venas de la misaŭdita adjektivo *ĉaŭĉu*, kiu signifas "abunda je cervoj": tiel ĉukĉoj-cervistoj nomas



sian landon, kompare al alia ĉukĉa tribo – fiŝkaptistoj, *ankaljin* (de la vorto "maro"; en la rusa tiu tribo nomiĝas "pomori").

Ĉukĉoj, kiuj okupiĝas pri cervo-bredado, estis aŭtonoma tribo; ili estis sufiĉe arogaj rilate al siaj najbaroj, kaj neniu alia popolo krom ĉukĉoj mem kaj rusoj en ilia lingvo estas nomata "homoj". En unu ĉukĉa mito pri apero de la mondo oni atribuas al rusoj la inventon de teo, tabako, sukero, salo, fero kaj negoco pri tiuj varoj kun ĉukĉoj. Tamen, laŭ ĉukĉoj, rusoj neglektis sian rolon kaj komencis militi. Ĝuste tiu milito kaŭzis tion, ke dum longa tempo tiuj popoloj fakte ne havis negocajn rilatojn. Nur kiam la prizono en Anadir, nuntempe la plej granda urbo en Ĉukotko kun ĉ. 10 mil loĝantoj, estis detruita, la negocaj rilatoj komencis reestabliĝi.

Dum soveta tempo kadre de la fama programo "Malgrandaj nordaj etnoj" ĉukĉoj estis translokigitaj el siaj kutimaj loĝlokoj al modernaj setlejoj kun brikaj konstruaĵoj, provizitaj je elektro kaj centra hejtado. Oni adaptis la cirilan alfabeton al la ĉukĉa lingvo kaj malfermis kelkajn lernejojn. Nuntempe la tradiciaj loĝejoj kaj aliaj elementoj de ĉiutag-eco estas renkonteblaj nur en la landhistoriaj muzeoj.

Preskaŭ ĉiuj ĉukĉoj nun estas kristanoj, nur unuopuloj plu restas adeptoj de ŝamanismo. En la ĉukĉa lingvo ekzistas multaj kristanaj libroj, ankaŭ Biblio.

## La ĉukĉa lingvo

La ĉukĉa lingvo apartenas al la familio de ĉukotko-kamĉatkaj lingvoj, grupo de paleoaziaj lingvoj. La familio estas sufiĉe izolita kaj entenas kelkajn pliajn lingvoj de malgrandaj nordaj etnoj: kereka lingvo (lasta parolanto mortis en 2005), itelmena lingvo (nuntempe ĉ. 50 parolantoj), alutora lingvo (ĉ. 2000), korjaka lingvo (ĉ. 3000) kaj propre la ĉukĉa lingvo (ĉ. 8000).

Interesa trajto de la lingvo estas la maniero uzi dudekojn por kalkulo, kaj ĉiuj grandaj nombroj (30, 40, 50, 100,

1000) estas derivataj de la baza 20-uma sistemo; pro tio la plej granda nombro por ĉukĉoj estis 4000 (20 oble 200). Paralele al la tradicia nombra sistemo nun ekzistas ankaŭ la sistemo, alprenita el la rusa lingvo – kun dekoj.

Alia interesa historio estas ligita al la ĉukĉa alfabeto. La lingvo mem sufiĉe longe estis senalfabeta, nur en la 1930-aj jaroj, kiam soveta lingvistoj dum mallonga tempo provizis preskaŭ ĉiujn senalfabetajn lingvojn de tiama USSR je alfabetoj, oni faris tion ankaŭ por la ĉukĉa lingvo: dum tre nelonga tempo estis uzata latinbaza alfabeto, kiu estis poste anstataŭigita per la cirilbaza; la lasta estis ankoraŭ dufoje reformita en la 1950-aj kaj 1980-aj jaroj por aldoni kelkajn grafemojn por specifaj ĉukĉaj fonemoj.

Tamen en 1930-aj jaroj la lingva ekspedicio de fama rusa lingvisto kaj vojaĝanto Voldemar Bogoraz en tundro trovis la unuopan ĉukĉan paŝtiston Tenevil, kiu uzis propran ideograman skribon por la ĉukĉa lingvo. Lia skribmaniero uzis ne fonemojn, sed ideogramojn (simile al la ĉina skribo), kiuj signifis certajn, foje eĉ tre abstraktajn, nociojn. Krom li mem la skribmanieron posedis ankaŭ lia filo, kaj ili uzis tiun skribmanieron por sendi malgrandajn mesaĝojn unu al la alia dum paŝtado, alligante notojn al la kolringo de paŝtohundo. Poste en la 1950-aj jaroj la dua ekspedicio al tiu loko jam ne plu trovis Tenevil-on – li mortis, laŭ la oficialaj fontoj, kelkajn jarojn antaŭe. Sed oni sukcesis trovi sub la neĝo keston kun liaj propramanaj skribaĵoj. Entute oni povis distingi ĉ. 1000 signojn, kelkaj el kiuj estis tre kompleksaj kaj abstraktaj. Malfacilis kredi, ke la tuta skribmaniero – unueca kaj kohera – estis elpensita de unu genia paŝtisto, kaj oni nun opinias, ke li estis inspirita de la skribmaniero, uzata en tiu regiono ankaŭ antaŭe kaj aperinta dum la 18-a jarcento. En tiuj ideogramoj eblas vidi paralelojn kun la ĉinaj skribsistemoj.

### La ĉukĉa kulturo

Malgraŭ la sufiĉe modesta kvanto de ĉukĉoj kaj eĉ malpli granda nombro de denaskuloj (nur ĉ. 70% de ĉukĉoj opinias, ke ili parolas sian lingvon kiel la denaskan) la ĉukĉa lingvo havas propran kaj sufiĉe evoluintan kulturon: aperas gazetoj kaj revuoj, oni eldonas librojn – kaj originajn, kaj tradukitajn.

En la elementa lernejo (la unuaj 3 klasoj de la 11-klasa lernejo) en kelkaj regionoj oni instruas en la ĉukĉa, poste (ekde la mezlernejo) oni jam instruas nur en la rusa lingvo, tamen la ĉukĉa lingvo plu restas kiel studobjekto.

La plej fama kaj konata ĉukĉa verkisto estis Jurij Ritĥeu (kutima anglalingva transskribo estas Yuri Rytcheu; germane – Juri Rytcheu). Li naskiĝis en 1930 en Ĉukotko kaj lia avo estis ĉukĉa ŝamano. Verŝajne pro tio li dum naskiĝo ricevis la nomon “Ritĥeu”, kio en la ĉukĉa signifas “nekonata”. Sed tiu nomo kontraŭis al la reguloj de

soveta nomregistrado kaj li estis devigita preni kutimajn rusajn antaŭ- kaj patronomojn (Jurij Sergeevič), lasinte la “ŝamanan” nomon kiel familinomon.

Naskiĝinte en malgranda ĉukĉa vilaĝo li sukcesis perlabori monon kaj atingi Sankt-Peterburgon (tiutempe ankoraŭ Leningrad), kie li finis Literaturan Instituton (la plej fama literatura altlernejo en Sovetunio). Jam estante studento li famiĝis pro siaj novelaroj, kiuj estis verkitaj en la ĉukĉa lingvo kaj aperis en la rusa nur tradukitaj. Post la studado li venis en Magadan-on (urbo, kiu situas sur la norda bordo de la Oĥotska maro), kie li laboris dum kelkaj jaroj kiel ĵurnalisto antaŭ sia rea translokiĝo en Sankt-Peterburgon, kie li travivis la reston de sia vivo.

Jurij Ritĥeu multon faris por kunigi la rusan kaj la ĉukĉan kulturojn: li multe verkis en la ĉukĉa kaj la rusa lingvoj; ĉiu lia verko temis pri lia propra popolo. Li verkis pri la paŝtisto Tenevil (“Songo en komenco de nebulo”), li aŭtoris scenarojn por pluraj filmoj pri ĉukĉoj (ekzemple, “Spuro de gulo”, “Kien formigras balenoj”). Sed krom tio li multe tradukis la tradician rusan literaturon en la ĉukĉan lingvon: tiel en la ĉukĉa aperis la verkoj de Puŝkin, Leo Tolstoj, Gorĵkij.

Laŭ la trista ironio de la sorto post la disfalo de Sovetunio liaj verkoj ne plu estis publikigataj en la nova Ruslando kaj li, restinte sen ajna enspezo, jam komencis pensi pri elmigro en Usonon. Feliĉe, alia tre fama “nacia” verkisto, Ĉingiz Ajtmatov, konatigis lin kun germana eldonisto kaj liaj libroj, tradukitaj en la germanan (kaj ofte tra la germana al multaj aliaj lingvoj), aperis en la eldonejo “Unionverlag” en Germanio.

Jurij Ritĥeu mortis en 2005 pro sango-kancero. La suma vendita eldonkvanto de liaj libroj ĝis 2005 jam superis duonmilionon da ekzempleroj kaj nun preskaŭ ĉiu biblioteko en Germanio havas liajn librojn. Ili estas plu eldonataj en Germanio, la plej lasta aperis en 2009 en la sama eldonejo sub la nomo “Polusa fajro” kaj estis varme akceptita de kritiko.

## RETE

<http://www.ibt.org.ru/russian/bible/chk/chkluk.pdf> –

Evangelio laŭ Luko en la ĉukĉa lingvo

<http://esperanto.mv.ru/Cxukcxoj/index.html> – Rakontoj

pri ĉukĉoj fare de V. Eroŝenko (en Esperanto). Fama blinda Esperanta verkisto vizitis Ĉukotkon fine de la 1920-aj jaroj kaj priskribis la tiaman vivmanieron de ĉukĉoj en kelkaj siaj rakontoj.

## Subtenu la agadon de TEJO!

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi povas helpi ankaŭ al konkretaj agaderoj de TEJO.

Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi la UEA-konto "tejtej" (indiku la celon de la donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas fari donacon por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJKon" – per ĝi TEJO subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj en IJK;
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO.

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe <[www.uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)> aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

## JUNA AMIKO – Internacia E-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

*Modela stilo kaj facila lingvaĵo* (1500 vortradikoj sen glosoj), *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <[www.junaamiko.inf.hu](http://www.junaamiko.inf.hu)> aŭ en <[www.lernu.net](http://www.lernu.net)>!

## ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al Koresponda Servo Mondskala jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj.

Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, ne uzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B. P. 6, FR-5xx0, Longeville-en-Barrois, Francio**

## KOTIZTABELO DE UEA POR 2009

**MG** Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

**MJ(-T)** Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago)

**MA(-T)** Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto

**MA** ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto

**SA** Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA

**Kto** Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO

**SZ** Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

| Lando/valuto       | MG   | MJ(-T) | MA(-T) | SA   | Kto  | SZ    |
|--------------------|------|--------|--------|------|------|-------|
| Aŭstralio/dolaro   | 16   | 40     | 100    | 60   | 56   | 200   |
| Aŭstrio/eŭro       | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Belgio/eŭro        | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Brazilo/eŭro       | 5    | 12     | 30     | 18   | 11   | 60    |
| Britio/pundo       | 7    | 18     | 45     | 29   | 18   | 90    |
| Ĉeĥio/krono        | 170  | 420    | 1050   | 670  | 425  | 2100  |
| Danio/krono        | 70   | 175    | 440    | 280  | 180  | 880   |
| Estonio/krono      | 100  | 240    | 600    | 380  | 245  | 1200  |
| Finnlando/eŭro     | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Francio/eŭro       | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Germanio/eŭro      | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Greklando/eŭro     | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Hispanio/eŭro      | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Hungario/forinto   | 1600 | 4000   | 10000  | 6400 | 4000 | 20000 |
| Irlando/eŭro       | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Islando/eŭro       | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Israelo/eŭro       | 7    | 18     | 45     | 27   | 16   | 90    |
| Italio/eŭro        | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Japanio/eno        | 1500 | 3700   | 9200   | 5500 | 3300 | 18400 |
| Kanado/dolaro      | 14   | 34     | 86     | 52   | 31   | 172   |
| Latvio/lato        | 4    | 11     | 27     | 17   | 11   | 54    |
| Litovio/lido       | 20   | 50     | 130    | 80   | 50   | 260   |
| Nederlando/eŭro    | 10   | 24     | 59     | 38   | 23   | 118   |
| Norvegio/krono     | 75   | 190    | 470    | 280  | 170  | 940   |
| Nov-Zelando/dolaro | 20   | 50     | 125    | 75   | 45   | 250   |
| Pollando/zloto     | 20   | 50     | 130    | 80   | 50   | 260   |
| Portugaliao/eŭro   | 8    | 20     | 50     | 32   | 20   | 100   |
| Rusio/eŭro         | 5    | 12     | 30     | 18   | 11   | 60    |
| Slovakio/eŭro      | 7    | 17     | 42     | 27   | 17   | 84    |
| Slovenio/eŭro      | 7    | 18     | 45     | 29   | 18   | 90    |
| Svedio/krono       | 90   | 220    | 550    | 350  | 220  | 1100  |
| Svislando/franko   | 15   | 38     | 95     | 57   | 34   | 190   |
| Usono/dolaro       | 13   | 32     | 79     | 47   | 28   | 158   |
| TARIFO A/eŭro      | 6    | 16     | 40     | 24   | 14   | 80    |
| TARIFO B/eŭro      | 6    | 16     | 40     | 24   | 14   | 80    |

**ALIAJ LANDOJ** Luksemburgio laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

**TARIFO A** Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

**TARIFO B** Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

# Malbona elekto

Kossi S. Woudji, Togolando/Senegal


 facila

Dio kreis Afrikon kaj la ceteran mondon, poste la nigrulojn kaj blankulojn. En Afriko Dio lokis tion, kio povas plaĉi al la kreitaj homoj: mult-nombrajn bestojn por **ĉasistoj**, fiŝ-riĉajn riverojn por fiŝ-kaptistoj, fruktojn, kiujn oni povas kolekti sen granda peno, kaj ĉiam-varman veteron. En la ceterajn partojn de la mondo Dio metis malvarmon, glacieron, neĝon, malbonan teron, sed ankaŭ librojn kaj la sciojn, kiujn ili enhavas.

Post tio Dio demandis unue la nigrulojn, kion ili volas elekti por si. La nigruloj elektis Afrikon, kaj la blankuloj do devis kontentiĝi pri la cetera mondo. Nu, la estonteco montris, ke la nigruloj faris grandegan eraron. Certe, la blankuloj ĉiam suferis pro malvarmo kaj devis ĉiam

multe labori por eltiri manĝaĵojn el la nefruktodona tero, sed la scienca enhavo de la libroj donis al ili mir-indajn povojn, dank' al kiuj ili sukcesis konstrui komfortajn domojn, fari varmigajn vestojn kaj devigi la teron doni al ili grandan kvanton da fruktoj.

Kompreninte sian eraregon, la nigruloj nun deziras kleriĝi. Kaj nun ili multon lernas ĉe la blankuloj.

## KLARIGO

**ĉasisto** – la homo, kiu profesie kaptas kaj/aŭ mortigas bestojn

# Batalema ĉevalo kaj saĝa malriĉulo

Zoran Ćirić, Serbio


 facila

Unu malriĉulo alligis sian ĉevalon al unu apud-voja arbo kaj eksidis por tagmanĝi. En tiu momento aperis iu riĉulo kaj komencis alligi sian ĉevalon al la sama arbo.

– Ne ligu vian ĉevalon al tiu arbo, – diris la malriĉulo.  
– Mia ĉevalo estas tre maltrankvila – ĝi povas mortigi vian ĉevalon. Uzu iun alian arbon.

La riĉulo respondis:

– Mi ligos mian ĉevalon kie mi volas.

Kaj li alligis sian ĉevalon al la sama arbo kaj eksidis por tagmanĝi. Subite oni ekaŭdis ian bruon: la ĉevaloj interbatalis. La homoj rapide ekstaris por trankviligi ilin, sed jam estis malfrue. La ĉevalo de la riĉulo jam estis mortigita.

– Ĉu vi vidas, kion faris via ĉevalo?! Vi devos pagi por tio! – ekkriis la riĉulo tre kolera. Li kaptis la malriĉulon kaj venigis lin al la juĝisto.

– Ho, saĝa juĝisto, – diris la riĉulo. – La ĉevalo de tiu ĉi homo mortigis mian ĉevalon, mian belan, bonan, trankvilan ĉevalon. Li devas pagi al mi pro tio aŭ esti malliberigita.

La juĝisto turnis sin al la malriĉulo.

– Ĉu via ĉevalo mortigis la ĉevalon de tiu ĉi homo? – demandis li, sed la malriĉulo nenion respondis.

– Ĉu vi ne povas paroli? – demandis la juĝisto.

La malriĉulo daŭre silentis. La juĝisto faris ankoraŭ kelkajn demandojn al la malriĉulo, sed la malriĉulo tute ne parolis. Tiam la juĝisto turnis sin al la riĉulo kaj diris:

– Kion mi povas fari? Tiu homo tute ne povas paroli!

– Ho, ne, – ekkriis la riĉulo, – li povas paroli, same kiel ni. Ja li parolis kun mi ĉe la vojo.

– Ĉu vi certas pri tio? – demandis la juĝisto. – Kion li diris?

– Mi certas. Li tre klare diris: “Ne ligu vian ĉevalon al tiu arbo. Mia ĉevalo estas maltrankvila kaj povas mortigi vian ĉevalon. Alligu la ĉevalon al iu alia arbo.”

– Ĉu?! Sed se li antaŭ-informis vin, li ne devas pagi. Vi mem estas kulpa! Vi devis trakti lian informon serioze, – diris la juĝisto al la riĉulo kaj poste li demandis la malriĉulon:

– Kial do vi ne respondis al miaj demandoj?

– Sed ĉu ne estas klare? Se mi dirus, ke mi informis lin, li verŝajne kontraŭus tion kaj vi ne povus scii, kiu el ni parolas la veron. Mi scias, ke vi rapide trovos la veron, se mi lasos lin rakonti ĉion mem-stare.

Kaj la juĝisto decidis, ke la malriĉulo ne devas pagi al la riĉulo por la mortigita ĉevalo.